# IJK 2019 - Slovakio (Lipt. Hrádok)

Pli detala prezentaĵo pri la ejo, alvenebloj, ekskursoj (ink. multajn bildojn ankaŭ de pasintaj eventoj)

# La kongresejo - Ĉio en 1 konstruaĵo

- **1 granda konstruaĵo** (“Arbarmezlernejo de Liptovský Hrádok”) kiu disponeblas je studentgastejo, manĝejo, sporta halo, klasĉambroj redaktitaj por diversaj celoj, diskejo, trinkejo, gufujo (lingvoinstruado, spektado da filmoj, ktp.) - slovaka retejo: http://www.slslhr.sk/
- Rimarko: por pli “pompaj” programeroj - nacia vespero, malfermo kaj fermo, ktp. - ni uzos la **urban teatrejon** kiu troviĝas tuj apud la kongresejo (50 metroj)

Urba teatrejo






Malsanulejo
Urba teatrejo
Dom kultúry
Vendejo
Girsíkov park mladých
Poliklinika
Jozefa Dekreta Matejovie
Zdravotná cesta
Lekáreň na Hradnej, spol. s ro
CBA Potraviny Belanská, PJ 047
Vendejo
Základná škola s materskou školou JD...
Lekáreň Pharmacia
Belanská
Studenthejmo kun manĝejo
Stredná odborná škola lesnícka a drevárska...
Cesta pri železnici
Lernejo
Hradná
Vojo al kongresejo
Tendumejo
Stacidomo - busa kaj trajna
Tatra banka
Liptovský Hrádok
Pizza Bosske
Cesta národného povstania
Mapa
Google
3D

# La kongresejo

**Jes, eĉ rapida vifio (eduroam) kaj salonoj kun komputiloj disponeblos**





# Studentgastejo

- Kutime **2-3 litaj ĉambroj** (por IJK ni eble aranĝos elekton inter 2-4 litaj ĉambroj)
- **Favorpreza** - io simila al la loĝprezoj de la UK 2016 en Nitra aŭ SES-oj (7-10 Eŭroj po nokto)
- **Pluraj amasloĝejoj** - ni ŝatus organizi pli malgrandajn (po 1 en ĉiu etaĝo - entute 7-8) por ke ili estu alireblaj por ĉiuj kongresanoj
- ne timu la gastejo **havas lifton** kiu alportos vin al ĉambroj kun belega vido :)



# La ĉefstudentgastejo



- renovigita antaŭ 1-2 jaroj
- plimalpli 70 ĉambroj
- 7-8 amasloĝejoj (-inaj, -malinaj, -geaj, ktp.)
- kuirejoj por memzorgantoj

## SPACO POR TENDUMI



## EĈ SPORTUMI EBLAS



# Manĝado

- En la **“mezlerneja” manĝejo** - ni antaŭe kontrolos kvaliton de manĝoj :)
- **Por veganoj** - pritraktita alia firmao kiu jam kuiris por niaj eventoj vegane kaj eĉ viadmanĝantoj ege ŝatis :)
- **Se vi volas esti memzorganto** - 2 vendejoj tuj apud la konkresejo kaj kaze ke vi ege volas ŝpari eblas aĉeti ĉe Lidl kiu troviĝas 5 minutoj de la kongresejo (Pri kuirejoj ni baldaŭ informos vin pli sed certe estos)



# Drinkejo, diskejo, koncertejo











# Kaze de tro multe da aliĝintoj ...

Ne timu, ni pripensis ankaŭ la eblecon ke tro multe da homoj aliĝos al la kongreso (IJK-j en mezeŭropo havas kutime ege multe da kongresanoj)

- 1-a solvo - tuj apud estas **dua studentgastejo** (100-200 metroj de la ĉefa kongresejo) - taŭgas por homoj kiuj pli ŝatas trankvilecon nokte (http://www.soselh.sk/ )
- 2-a solvo - **aldona gastejo** (ankaŭ ege proksime de la konresejo) - sed vere nur kaze de pli ol 300 kongresanoj kiuj elektos loĝadon en ĉambroj
- 3-a solvo - loĝado en pli **luksa hotelo** (http://www.smrek.sk/uvod) aŭ en kabano (goo.gl/6mLxWQ) - ni helpos kun ĉio :)

Rimarko - ni ŝatus ĉiujn eblojn proponi tuj ekde komenco en la aliĝilo kaj ne volas elekti sistemon "kiu unue venas, unue ricevas" konsciante ke diversaj homoj havas diversajn bezonojn por senti sin komforte

# Aldonaj studentgastejoj (en trankvilaj lokoj)

**STUDENTGASTEJO 2 - 20-25 ĉambroj (2-4 personaj)**




**STUDENTGASTEJO 3 - Malfermita en 2017 - tuj apud Lidl :)**



# Pli “luksa” loĝado

**HOTEL SMREK**




**BOROVÁ SIHOŤ**




Tatroj
Urba kasteleto kun lageto
Malsanulejo
Urba teatrejo
Gastejo 2
Vendejoj
Gastejo 3
Stacidomo
Kongresejo
Ebla tendumejo
Belá
GÜDE Slovakia, s.r.o
Borová Sihoť, s.r.o
GTB a.s
F Team
NÁRODNÝ PARK NÍZKE TATRY...
Liptovský Hrádok
Slovenská sporiteľňa
Slovenská pošta Liptovský Hrádok 1
Dom kultúry
Základná škola s materskou školou JD...
Stredná odborná škola lesnícka a drevárska...
Stredná odborná škola elektrotechnická
Slovnaft Celiny
Gymnázium
Hrádocké arborétum
LH Point -
Rettenmeier Tatra

# Por tiuj kiuj ŝatas tendumi kaj loĝi ĉe naturo ...

- En la urbo mem troviĝas "profesia" **kampadejo** - retejo: http://www.borovasihot.sk/sk/camp (eĉ kun angla kaj germana versio :P ) kaj estas eblo loĝi tie ankaŭ en lignaj dometoj aŭ apuda hotelo
- 1 minuto de vera montara naturo :)
- Freŝa aero kaj eblo preni akvon rekte de natura akvofonto
- 10 minutoj piede de la kongresejo
- Rimarko: ni komprenas ke iuj ne volas loĝi 10 minutoj for de la kongresejo pro tio ni **aranĝos ankaŭ eblon tendumi tuj apud ĝi** en la ĝardeno de la mezlernejo



# Tendumejo 2

Freŝa akvo





# Sekureco

- la urbeto mem estas **sufiĉe sekura** (kiel kutima urbeto en Eŭropo)
- la **kongresejo estos nur je niaj disponoj** kaj la studentgastejo estas konektita per tunelo kun la klasĉambroj kaj programejoj (eblus kontroli dum malferma tago kiu ne devus esti en la studengastejo) - tamen ŝlosiloj por fermi la ĉambroj disponeblos :)



# Alvenebloj - relative facile kaj malmultekoste atingebla

- **Atingebla trajne (buse) de jenaj internaciaj flughavenoj** - Bratislava (SK), Poprad (SK), Košice (SK), Brno (CZ), Praha (CZ), Ostrava (CZ), Vieno (AT), Budapest (HU), Krakow (PL)
- Trajnoj (Busoj) - konektoj (eĉ internaciaj) kontroleblas ĉe https://cp.hnonline.sk/vlakbusmhd/spojenie/
- Pluraj trajnkompanioj (kiuj batalas unu kontraŭ la alia per favoraj prezoj) - regiojet.sk , le.cz, zssr.sk, cd.cz
- **Rektaj trajnoj (busoj) al la regiono** de Prago (ĉiu 1-2 horo), Bratislava (1-2 horo), Budapest, Krakow, ktp.
- Ege detalajn alveneblojn ni certe prilaboros kaze de elekto
- Al preskaŭ ĉiuj flughavenoj flugas kompanioj kiel Ryanair, Wizzair, EasyJet, Smartwings, ktp.
- **Tiuj kiuj ne ŝatas flugi** - ni rekomendas veni buse (Flixbus, Studentagency) aŭ trajne kun ŝanĝo en Bratislava
- **Liptovský Hrádok troviĝas ĉe la ĉefa slovaka trajnlinio** - kaj la kongresejo 1 minuto de la stacidomo de Lipt. Hrádok
- Estas eĉ trajnkonekto inter Liptovo kaj Moskvo!



Liptovský Hrádok
Praha
6 horoj
Ostrava
2 horoj kaj duono
Kraków
5 horoj
Brno
5 horoj
Žilina
1 horo kaj kvarono
Poprad
40 minutoj
Košice
2 horoj
Wien
5 horoj kaj duono
Bratislava
4 horoj
Budapest
6 horoj
Aŭstrio
Pollando
Ĉeĥio
Hungario
Slovakio

# Antaŭ- kaj post kongrese - esperanta somero en Mezeŭropo

- Eblas partopreni **SES (Somera Esperanto Studado) en Ĉeĥio** (kiu estas perfekte konektita kun Slovakio kaj esplorinda lando)
- Ni certe bonvenos okazon de **IJS (Internacia Junulara Semajno)** en Hungario por povi proponi eĉ 3 esperantaj semajnoj en mezeŭropo :)
- Alie vi povas turismumi favorpreze en slovaka naturo (Tatroj), viziti historiajn urbojn (Krakow, Prago, Budapeŝto, ktp.), ripozi ĉe akvo, ktp.
- Kaj cefe: **eblas partopreni UK-n en Finlando** (ni jam estas pripensantaj karavanon de aŭ al Finlando)

# Galerio



Liptovský Hrádok -> Esperanta traduko - Liptova Kasteleto

- Jen pruvo ke ĝi vere ekzistas ankaŭ en jaro 2018

# Naturo





# La urbeto



Ĉefa placo



# Eblaj ekskursoj



TATRALANDIA



# Subĉiela muzeo kaj “Žiarska” valo





# Akvoparko Bešeňová kaj urbo Košice






# Spišský hrad kaj Slovenský raj





# Kie la KLF okazos? (Liptovský Mikuláš)

- Námestie osloboditeľov (Placo de liberigantoj)





Kaj fine kelkaj fotoj
de pasintaj eventoj
kaj niaj
programeroj

# Ni fieras pri niaj sukcesoj dum organizado de la UK 2016






# Vespera programo de la Junulara Programo de la UK 2016





# Pikniko okaze de la Junulara Programo de UK 2016



# SKEJ-anoj en akceptejo dum SES



# Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo (en Liptovo)





# Sporta programo de SKEJ dum SES





# Niaj spertuloj pri kreivaj metiejoj kundividas siajn kapablojn :)











# Prelegoj kaj trejnadoj (ekzemple dum Centrejo 2017)








# Kaj pli da prelegoj (UK, YoFest!, …)





# SKEJ-anoj <3 (preskaŭ 100 membroj)



NI PRETAS GASTIGI CENTOJN DA JUNAJ ESPERANTISTOJ EN URBETO APUD NATURO KUN FREŜA AERO, AKVO KAJ REGIONO KUN LONGTEMPA HISTORIO KAJ MULTAJ TRADICIOJ

DANKON :)